

BONA ESPERO



Cirkulero 53

por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r.a.

prezidanto: Otto Nelken,

Hirschfeldstr. 6, D-59581 Warstein, telefono+fakso: 02902/57460

retadreso: u.nelken@t-online.de

Warstein, 99-12-10



Karaj amikoj kaj subtenantoj,

ankaŭ ĉi-foje la plej grava afero antaŭ ĉio estas: Gisela kaj Jean Passarella kune kun siaj ambaŭ filinoj elmigros nun definitive al Bona Espero en la venonta somero, post kiam la brazilaj ŝtataj instancoj fine forigis la lastajn altegajn burokratajn obstaklojn. Same estas ĝojinde, ke Jean, kiu laboris dum la lastaj kvar monatoj en la infanbieno, jam oktobre ĉijare eniris la estraron de Bona Espero kiel administranto. Ursula kaj Giuseppe estas feliĉaj kaj atendas senpacience la revenon de la tuta familio.

Intertempe elektita en la magistraton kiel prezidantino de la junulara komitato, Ursula prizorgas en Alto Paraíso ekde iom da tempo aldone al la aliaj ankaŭ kelkajn infanojn nur dumtage (la nokton ili pasigas hejme). Kelkfoje oni zorgas entute pri 35 infanoj en la bieno kaj la urbo. Ĉ. 20 da ili partoprenas – krom la lernejan instruon – dufoje semajne profesiajn klerigajn kursojn de la urbo. Alexandro kaj Donazetti nodas entuziasme tapiŝojn, mansakojn k.s., post kiam Ursula aĉetis 1000 m da ŝnuro. Maria, Iraci kaj Gabriele lernis kudri per la kudromaŝino kaj brodi speciale kaj ĝenerale.

Alexandro, la speciala ĉagreninfano longtempe, dume ne nur iĝis bonega lernanto, sed mem zorgas - ankaŭ ekster la lernejo – eksterordinare bone pri la aliaj infanoj, antaŭ ĉio pri la novaj. Tiel ekzemple pri Ismael, ankoraŭ eĉ pli problema ol Alexandro antaŭe estis.

Lasttempe oni petas pli kaj pli Bonan Esperon pri akcepto de grave mistraktitaj, misuzitaj kaj malbonkonduktaj infanoj, sed bedaŭrinde mankas nun i.a. daŭra subteno por Ursula kaj Giuseppe flanke de la kunlaborantoj. Pli longan planadon de la laboron kun brazilaj helpuloj evidente ne permesas ties mentaleco, precipe koncerne la bienon kiu estas romantika soleca loko por ni.

Dum kiam Maria, Adarci kaj Silvana, psikologino, helpas al Ursula ĉe ŝia abunda kaj malfacila laboro en la urba domo, Giuseppe devas rezigni pri tia subteno post la provizora adiaŭo de Jean kaj la definitiva foriro de Santana. Post streĉa kroma pluklerigo Santana nun serĉas pli perspektivan, pli bone pagatan postenon en urbo. Momente mankas antaŭ ĉio la kunlaboro de kapablaj volontuloj por prizorgi la infanojn en la bieno. Tial ni ĉi-tie transdonas al vi la helpopeton de la du Grattapaglia – ili urĝe bezonos praktikan subtenon de februaro ĝis la alveno de la familio Passarella. Se necesas, ni volonte helpos al vi sendante german-kaj esperantlingvajn prospektojn same kiel aliajn informojn.

Kaj ĉi tie ankoraŭ kelkaj novaĵoj:

Ĉi-jare en aprilo Amanda naskis sanan knabinon, kiun ŝi nomis Kauan.

Per peniga laboro Giuseppe kaj Jean konstruis novan elektran akvopumpilon, izolis kurtajn cirkvitojn kaj riparigis denove la eksteran lumigon. En sia lasta letero Ursula kaj Giuseppe en tiu konteksto emfazis laŭdis Jean kiel ne nur respondecan sed kapablan, bonvolan kaj tre kompetentan, mallonge: kiel viro, kiu tre bone kunlaboras.

Vania donas plu regule siajn muzikajn lecionojn dufoje monate kaj tre sukcese. Ŝi eĉ koncertis kun siaj gelernantoj antaŭ la usonaj Rotary-klubanoj!

Ĉi-somere la bienon vizitis eĉ la ŝtatestro de Brazilo.

En Alto Paraíso intertempe protektas mezalta muro la parcelon kaj domon de Bona Espero, i.a. kontraŭ vagantaj bestoj.

Antaŭ nelonge en la ĉeesto de la prezidanto de la Brazila Esperanto-ligo kaj kun partopreno de la infanoj de BE la urbestro konsekris la plej larĝan straton de la urbo antaŭ ĉi-tiu domo tute oficiale kaj solene per stratŝildo kiel „Avenida Esperanto“.

Andreia laboras kiel volontulino en la magistrato por la rajtoj de la infanoj, t.e. sub la gvido de Ursula. Ŝi povus esti salajrulinino en la venonta jaro. Per tio pliboniĝos verŝajne la ŝancoj, pli bone prizorgi kaj prosperigi la eksajn bonesperanojn, kio nepre necesas.

Intertempe Ursula estas vokita kiel membrino en la mondfaman Rotary-klubon kaj kompreneble esperas pri aldona helpo por sia laboro per la eblaj rilatoj per tio.

Ursula kaj Giuseppe petas vin havi komprenon, ke ili ne povis danki ĉiujn donacintojn persone, kiuj ĉeestis la UK en Berlino, ĉar ili plej ofte ne konas nomojn nek donacojn detale.

Ili tre kore salutas kune kun ni ĉiujn novajn membrojn kaj subtenantojn kaj dankas tiujn kaj la ĝisnunajn pro iliaj senlacaj subtenoj ĉiamaniere. Sen tio por Bona Espero ne eblis akcepti kaj prizorgi tie la nunajn infanojn.

Ĉi-tie specialan dankon al nia magiisto „Don Espero“ (Bernd Schönberner, vicprezidanto), kiu pro siaj magiaĵoj ĉiam iĝis pli konata kaj ŝatata kaj multe prezentadis, tial li liveras per siaj gajnoj tre grandan parton de la mondonacoj al nia asocio. Se vi ŝatus havi magiaĵojn por viaj familiaj festoj k.s., vi povas inviti lin kaj tiamaniere subteni ankaŭ la infanojn (tel. 0291-82552).

Al vi ĉiuj mi deziras nome de la tuta estraro kaj de ĉiuj bonesperanoj:



ĜOJAN KRISTNASKON KAJ BONAN NOVJARON 2000!!!



Otto Nelt



Jean kaj Giuseppe kantas kun la infanoj

Donaco-konto:

Konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ / bankkodo 464 510 12)

La adreso de la kasistino:

Bona Espero e.V., Brigitte Löffler, Zum Loh 9, DE-59909 Bestwig, Tel.: 02904 / 6417